XXXII ORDINARA DIMANĈO – 8a de novembro 2009

TIU MALRIĈA VIRINO ENĴETIS PLI OL ĈIUJ ĴETANTOJ EN LA MONKESTON
– Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mk. 12, 38 - 44

[En tiu tempo], en sia instruado [en la templo] Jesuo diris: Gardu vin kontraŭ la skribistoj, kiuj amas promenadi en roboj kaj salutojn sur la placoj, kaj ĉefseĝojn en la sinagogoj, kaj ĉeflokojn ĉe festenoj; kaj kiuj formanĝas la domojn de vidvinoj, kaj por preteksto ili longe preĝas; ili ricevos pli severan kondamnon.

Kaj sidante kontraŭ la monkesto, li rimarkis, kiel la homoj enĵetas monerojn en la monkeston; kaj multaj riĉuloj enĵetis multon.

Kaj venis unu malriĉa vidvino, kaj enĵetis du leptojn kiuj faras kodranton,

Kaj alvokinte al si siajn disĉiplojn, li diris al ili: Vere mi diras al vi, ke tiu malriĉa vidvino enĵetis pli ol ĉiuj ĵetantoj en la monkeston;

Ĉar ili ĉiuj enĵetis el sia abundo, sed ŝi el sia senhaveco ĵetis ĉion, kion ŝi havis, sian tutan vivrimedon.

Por bone kompreni la mesaĝon de la evangeliistoj, oni devas koni iliajn literaturajn regulojn, iliajn literaturajn stilojn. Unu el tiuj ĉi nomiĝas triptiko. Kio estas la triptiko? Ĉeestas centra pli granda bildo kaj du pli malgrandaj bildoj ĉe la du flankoj, tiuj ĉi lastaj estas komprenigataj kaj eksplikataj nur rilate al tiu centra bildo.

Nu, la triptikan stilon oni uzas ankaŭ en la literaturo. Temas pri rakontoj kie estas centra epizodo kiun oni komprenigas kaj eksplikas pere de tiu kiu ĝin antaŭas kaj pere de tiu kiu ĝin sekvas.

Se oni ne konsideras tion oni riskas miskompreni la tutan signifon, kiel ĉi okaze, en tiu ĉi Evangelio.

Nun ni vidos la unuan parton de la bildo, “En sia instruado Jesuo diris: “Gardu vin...” – temas pri verbo en la imperativa formo, nome “estu atentaj”, ekzistas kategorio da homoj kiu estas ege danĝera”. Kaj Jesuo donas indikojn por ĝin tuj rekoni. “Gardu vin kontraŭ la skribistoj”.

Kiuj estas la skribistoj? Tiutempe, la skribistoj estis la neeraripovaj religiaj instruistoj, la skribisto estis la oficiala teologo, tiu kies vorto samvaloris kiel la Vorto de Dio. La skribisto estis eĉ pli grava ol la ĉefsacerdoto. Nu, Jesuo donas indikojn por ilin rekoni, ”ili amas promenadi en vestoj”, nome ili distingiĝas de la homamaso, kaj por vidigi al aliuloj ke ili havas apartan rilaton al la Sinjoro, ke ili estas super la homamaso ili uzas religian veston kiun ili distingas de la ceteraj homoj.

“Ili amas la salutojn sur la placo”. La saluto signifas omaĝon, ĝi signifas esti respektata pro iliaj nomoj kaj pro iliaj vokmanieroj, “ili amas havi ĉefseĝojn en la sinagogoj” – la ĉefseĝo en la sinagogo ne estas la antaŭa seĝo, kiel ni povas opinii. En la sinagogo, flanke, estis du ŝtupoj; la ĉefseĝo estis tiu supera, tiel ke la homoj sidiĝis sube. La ĉefseĝo signifas sin meti super la aliaj.

“Kaj la ĉeflokojn ĉe festenoj”, tiom da devoteco, tiom da spiritualeco alflankiĝas al granda manĝavido. La ĉefloko ĉe festeno estas tiu apud la dommastro kaj, do ĝi estas kie oni estas servita unue kaj pli bone.

Jesuo ridindigas tiun ilian apetiton dirante ke “ili formanĝas la domojn de vidvinoj”. La vidvino estas la bildo pri homo kiu bezonas helpon ne plu havante viron kiu ŝin prizorgas; ŝi estas protektinda estaĵo; “kaj, por preteksto ili longe preĝas”. Ne, vere, la evangeliisto ne diras ke ili longe preĝas por sin vidigi, sed “ili longe preĝas por preteksto”. Jesuo ne diras ke ili preĝas longe por sin vidigi, sed Li diras ke ili vidigas al la aliaj ke ili preĝas, nome, ilia preĝo estas ŝajnigo kiu baziĝas tute sur ilia profito.

Tiu estas la ununura fojo en kiu Jesuo kondamnas iun, ĉu temas pri pekulo? Ne, temas pri la reganta religia kasto, “Ili ricevos pli severan kondamnon”. Tiu estas la komenca bildo.

Poste ni vidos tiun centran. “Jesuo sidiĝas kontraŭ la monkesto” – jen kiu estas la vera Dio de la templo, ĝi estas la monkesto, ĝi estas Mamono, ĝi estas la profito. En la dua Libro de Makabeoj capito 3a, 6a versego estas skribite ke “la trezorejo en Jerusalem estas plena je nemezureblaj riĉaĵoj, tiel ke eĉ ne estas eble prikalkuli ĝian sumon”. Jen la vera Dio de la templo, jen la vera Dio de la skribistoj.

“Kaj la homamaso enĵetis en la monkesto la monerojn, poste venis vidvino” – ŝi estas ne nur vidvino, sed ŝi estas eĉ malriĉa – ŝi enĵetas du leptojn”, kaj Jesuo komentas, “ŝi ĵetis ĉion, kion ŝi havis, sian tutan vivrimedon”.

Jen la misformiĝo de Dio kiun faris la teologoj, la skribistoj. Tiam Jesuo ĵetiĝas sur tiuj skribistoj ĉar ili turpigis la vizaĝon de Dio, jen kial ili estas danĝeraj: ilia Dio ne estas la Patro de Jesuo, sed li estas Dio kiun ili kreis laŭ la bildo de siaj profitoj, de siaj apetitoj kaj de sia voreco.

En la libro de Readmono, Dio establis ke, per la enspezoj de la templo, oni devis prizorgi la vidvinojn kaj la georfojn, nome la bezonulojn. Ĉi tie la skribistoj sukcesis fari la malon; estas la vidvinoj kiuj malriĉiĝas por prizorgi la monkeston de la templo, tiun ĉi vampiron kiu suĉas ilian sangon.

Tiam Jesuo diras: ”ŝi el sia senhaveco ĵetis ĉion, kion ŝi havis, sian tutan vivrimedon”. Tio ne estas laŭdo, sed estas plendo pro la viktimo de la religio. Ĝi estas veo pro tiu ekspluatita homo kiu, anstataŭ ol esti si men vivtenata per la elspezoj de la templa monkesto, estas ĝuste ŝi kiu vivtenas tiun dion - vampiron.

Tiam Jesuo – kaj jen la fina parto de tiu triptiko - Li estas radikala: ”Ne estos lasita ĉi tie ŝtono sur ŝtono, kiu ne estos deĵetita!”. Religia institucio kiu prostituis la vizaĝon de Dio, religia institucio kiu estas mastrumata de homoj kiuj nur priatentas sian profiton devas definitive malaperi.